[noto] fonto: “La Revuo Orienta” (julio, 1934, JEI)

# Influo de Budaismo sur Japana Kulturo

**Dooken ŜIBATA**,

*Direktoro de Budaista Asocio en Imperia Universitato, Tokio*

trad. Okamoto Joŝicugu (?)

Ĝenerale la esenco de l′ religio troviĝas en kredo aŭ en paco de koro, sed la religio alportas al nia vivo brilajn kolorojn kaj rave mirindan transformiĝon, penetrante en ĉiujn fazojn de l′ homa vivo Mi donas ekzemplon en ĉiutagaj vivoj. En la pia sintenado de religiulo ĉe la manĝotablo oni povas trovi trankvilecon kaj noblecon, kiujn oni neniam trovas ĉe familioj sen religia disciplino. Kiam religiulo vizitas nekredantan familion kaj vidas la manĝotablon, li treege miros pri la besteca sintenado. En ĉiuj flankoj de l′ homa vivo religio forigas animalecon kaj nekulturitecon kaj alportas noblan kulturan vivon.

Kiel religio Budaismo enkondukita en Japanujon ankaŭ poluris la vivon de japanoj en ĉiuj flankoj kaj kulture progresigis ĝin. Ne estas troigo, eĉ se ni dirus ke preskaŭ ĉiu, kiun ni fieras al alilandanoj kiel japanan kulturon, ricevis iamaniere la baptadon de Budaismo. En tiu ĉi artikoleto mi volas priskribi al vi maldetale, kiel Budaismo penetris en japanan kulturon.

Laŭ oficiala kroniko Budaismo estis importita en Japanujon en la 13-a jaro de Imperiestro Kimmei (552 p. K.). Kaj de post kiam Kronprinco Ŝootoku regis kiel kredanto de Budaismo kaj enkondukis Budaismon kiel gvidantan instruon de l′ vivo de l′ popolo. (″Konstitucio el 17 artikoloj″, 604 p. K.), Budaismo penetris en popolamason pere de imperiestra familio. Kaj floris impona kulturo en Nara-epoko (710-774), kiu estas la unua floro de japana kulturo sur la kultura historio. Kiel greka kulturo en la historio de l′ Monda Kulturo, ĝi rakontas al ni neelĉerpeblan intereson kaj profundan misteron. Aŭ tion rememorigus al ni la fakto, ke en tiu tempo pere de Budaismo japanoj importis grekan kulturon, kion ni povas klare vidi en japanaj tiamaj skulptaĵoj.

Poste floris la eleganta kulturo de Heian-epoko (797-1192), kaj kiel profunde enpenetris en la kulturon la instruo de Ŝingon-sekto, kaj en beletristiko, en pentrarto, en politiko kaj en ekonomio oni povas trovi diversajn instruojn de Budaismo en formo transfigurita aŭ transformita kaj eĉ tro insiste prenis gvidantan potencon. Oni ankaŭ ne povas priparoli pri la kulturo en Kamakura-epoko (1192-1333), ignorante la influon de Ĵoodo-sekto kaj Zen-sekto. Precipe japana spirito, samuraĵismo, kiu klariĝis en Kamakura-epoko, estas floro de japana kulturo, kiun oni ne povas kompreni ignorante la instruon de Zen-sekto. Kaj poste en Edo-epoko (1603-1867) la ideo de populara Budaismo profunde penetranta en popolamason okupis la gvidantan pozicion kaj ĉiutagaj vivoj de japanoj estis kondukataj pli-malpli multe sub la influo de Budaismo en socia vivo, en politiko, en beletristiko kaj en belarto. Nun mi volas rakonti kiel profunde penetris Budaismo en japanan kulturon, donante kelkajn specialajn ekzemplojn.

La plej esenca spirito de japanoj estas sendube samuraĵismo (″*buŝidoo*″). Kompreneble ĝi devenis plejparte de realeco kaj amo al pureco de japana gento, sed ankaŭ samurajoj

bezonis havi budaisman pacon de koro por ke ili povu trankvile morti antaŭ sia mastro. En la okazo, kiam Kusunoki-Masaŝige komencis militiri kaj ankaŭ kiam Hooĵoo-Tokimune glavtranĉis la senditojn de Mongolujo, kaj en la okazo de la kompreno de esoteraĵoj de batalartoj kaj skermado, kaj en la nobla karaktero de Generalo Nogi, oni povas trovi grandan influon de ĵan-ekzerciĝo. Oni ne povus kompreni la fundamentan esencon de japana samruaĵismo, ne konante ĵanon, budaisman meditadon.

Ekzemploj en beletristiko. En japanaj tipaj beletristikaj verkoj, Genĵi-monogatari, Heike-monogatari, Man'jooŝuu, Kokin-ŭakaŝuu, Curezuregusa kaj ĵoruraj verkoj k. c. — en unuj el ili facile komprenebla instruo de Budaismo kaj en aliaj tre malfacila instruo de Budaismo estas gvidanta spirito de la verkoj. Precipe en Heike-monogatari troviĝas ia forto, kiu kaptas nian koron, ĉar ĝia verkinto rakontas la movon de l' homa koro kun milda amo de Budao. Kaj plie en la koro de l' verkinto, kiu trankviligis sian koron per kredo al Budaismo, troviĝis religia nobleco, kiu vivas kun Dio super ĉiuj komplikaĵoj de la surtera mondo. Ekzemploj en arkitekturo. Temploj de Toodai-ĵi, Hoorjuu-ĵi, Tooŝoodai-ĵi kaj preskaŭ ĉiuj japanaj trezoraj konstruaĵoj estas budaismaj konstruaĵoj. Kaj plie eĉ unu kolono, unu tabulo aŭ unu tegolo el ili estis konstruitaj de tiamaj popolanoj por montri piecon kaj kredon al Budao kun granda atento. Kiel ili ne domaĝis grandan elspezon kaj penigan laboradon por fari trankvilan ripozejon por Budao adorata! Eĉ hodiaŭ preskaŭ ĉiuj domoj de japanoj havas kapelon-ĉambron. Ĝi okupas la fundan parton de l' domo kaj tie estas apoteozataj Amitabo, Mahavairokano, Fondinto de l' Sekto kaj la prapatroj de l' familio. Kaj multaj budaistoj japanaj kredas ke tie oni povas solvi ĉiujn malfacilajn problemojn de l' vivo kaj ricevi fortojn por vivi ĉiutage.

En la vivo de japanoj oni povas trovi budaisman disciplinon en diversaj punktoj. Ekzemple la kutimo lavi manojn post la urinado aŭ kakado devenas de la instruo de Zen-sekto. Ceremonia teservado ankaŭ trovas sian fondinton en la tendaro de budaistoj. Takuano (peklita rafano), udono (orienta makaronio), misosupo (supo el miso, sojfaba pasto), peklitaĵoj kaj aliaj japanaj manĝaĵoj estis enkondukitaj de piaj kredantoj en iliajn familiojn imitante la kuirejon de budaismaj temploj. Japanaj etiketoj estis ankaŭ elpensitaj de budaistoj. Kiam budaistoj aplikas la spiriton servi al Budao en ĉiutagaj vivoj, la afabla kaj kompleza etiketo naskiĝas kaj en ĝi la plej grava estas nerompi malgajecon aŭ solecon.

Kiam tiel ni daŭrigus sensisteme ni trovos sennombrajn ekzemplojn. Se vi ankoraŭ havus ian dubon en la rezonado, vi mem serĉu instruon de Budaismo en iu ajn punkto de l' vivo de japanoj, kaj vi nepre trovos iun pruvon. Sekve ne estas troigo la konkludo ke japana kulturo estas budaisma kulturo en ia senco. Tiele Budaismo penetris en la spiriton de japanoj kaj produktis kulturon, kiun ni fieras al alilandanoj. Tio pruvas ke Budaismo en Japanujo ne estas filozofio, nek mortinta instruo, sed ĝi estas vivanta religio, kion mi volas certigi al ĝin nekonantaj okcidentanoj.